2-a Jaro, N-o 37 (89) APERAS S.A.T. SEMAJNE 10. Junio 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

PANEŬROPO

Per la burĝa gazetaro venis la sciigo, ke unuiĝo estis fondita, kiu laŭ mia modesta opinio ankaŭ tuŝas nian movadon, pro tio mi volas konatigi la legantaron kun la intencoj de tiu nova entrepreno.

Ĝi nomas sin “Paneŭropäische Union“ (tuteŭropa unuiĝo) kaj estas organizita kiel “superpartia“ amasmovado por akceli la unuiĝon de la eŭropaj ŝtatoj sur bazo de samrajteco, certeco kaj unuiĝo de limimposto.

Kial estiĝu Paneŭropo?

Ĉar neunuiĝinta Eŭropo kondukas ĉiam al milito kaj nesavebla pereo.

Ĉar nur unuiĝinta Eŭropo estas la savrimedo de nia estonteco, de niaj infanoj, de nia nacio (?) de nia ekonomio kaj libereco.

Ĉar neunuiĝinta Eŭropo neniam povas venki la konkuron de la cetera mondo, kiu sin kunigas ĉiam al pli potencaj grupoj.

Ĉar la unuiĝinta Usono montras al ni la preferojn de la limimpostunio kaj la frenezecon de la limimpostoj, kiuj arte malaltigas la salajron kaj altigas la prezojn; pro tio Paneŭropo signifas altigon de la salajro kaj malaltigon de la prezoj.

Ĉar sen Paneŭropo nova eŭropa milito ne estas evitebla, milito per gasoj, kiu ekstermos virojn, virinojn kaj infanojn malantaŭ la fronto.

Ĉar la progreso de la militekniko starigas Eŭropon antaŭ la elekto: paco aŭ pereo!

Ni vidas, ke tiu-ĉi movado havas punktojn por nia pensmaniero agrablajn, sed krom tio estiĝas la demandoj:

Ĉu tiu problemo povas esti efektivigata sen Esperanto?

Ĉu la nura unuiĝo, akcentante ankaŭ la nacion povas malebligi militojn?

Tiujn-ĉi demandojn ni nur povas nei.

2135.

REZOLUCIO

La konferenco de aktivaj gelaboruloj de profunuiĝoj de la urbo Pskov (Sovet-Unio), sendas sian varmegan saluton al strikanta laboristaro de Anglio, kaj alvokas ĉiujn anojn de profesiaj unuiĝoj, helpi al strikanta proletariaro de Anglio, kiel samtempa dekalkulo! ĝis kvarono de taga laborpago.

VIVU LA INTERNACIA SOLIDARECO!

Vivu la unuecfronto de batalo kontraŭ kapitalistoj. Ĉiuj helpu al strikantaj gefratoj de Anglio!

Laŭ deziro de konferenco sendis *Sorokin, (5336)*

El Bulgario

Dum Pasko — 3., 4., 5. Majo ĉi jare okazis distrikta Esp. konferenco en urbo T. Mi estas instruisto kaj havis okazon viziti ĝin, ĉar mi estis libera tiutempe. Sukceso estas atingita, malgraŭ ke estis burĝa afero. Okazis paroloj vizititaj de granda publiko, oni varbis novajn Esp-istojn inter kiuj ankaŭ estis proletoj. Sed bedaŭrindaj akcidentoj ekskluzivaj ne estas. Kiam mi parolis kun unu k-do li sciigis jenon:

Antaŭ la ekkomenco de l' konferenco oni ornamis la konferencejon per diversnaciaj standardoj. Iu ajn k-do pentrinta unu vinruĝan standardon ekdeziris envicigi ĝin inter alinaciajn. Li kaŝe lasas ĝin (mi diras kaŝe, ĉar alimaniere estas tre riske) kaj ĝis kiam li alkroĉas unu alinacian standardon, turnas sin kaj kion vidi? — la ruĝa standardo malaperigita “senpostsigne“.

Karaj tutmondaj k-doj! ĉi tiu ŝajne malgrava akcidento signifas multon por ni proletoj! Ĉi tio ne esprimas nur simplan nuligon de peceto de ruĝe kolorigita papero! En ĝi mi vidas (kaj ankaŭ vi) unu grandan malestimon, unu malicon, kontraŭ iaj ajn proletekdeziroj! Ĉiupaŝe oni volas sufoki nin. Sed ni ne ĉesos, ni ĉiam senlace iros antaŭen kaj antaŭen. Alvenos hela tago por ni, tago kiam ni mem estos forĝistoj de l' nia sort', kiam unuvoĉe kun tutmondaj proletoj ni ekkrias: for! diablen la fiburĝaron! . . .

Julo 4100

“Ribelantoj“ ne bezonas kuracistojn

La franca burĝaro estas tre fiera, esti “Libera Nacio“ kaj havi demokratan respublikon. Ĝi tre volonte memoras, ke ĝi estis la popolo, kiu faris 1789 la grandan francan revolucion, sur kies standardo estis legebla, “Libereco, Egaleco kaj Frateco“. Humaneco do devus esti la plej alta principo, kiu distingas la agojn de tia registaro. Kiel nun tiu humaneco aspektas, montras al ni la militmaniero de la francoj en Maroko kaj Sirio.

Alia pruvo por humaneco de la “Granda Nacio“ estas la fakto, ke la francoj kune kun la hispanoj ĝis nun malhelpis per streĉo de ilia tuta forto, ke la rifkabiloj ne ricevu la helpon de la “Geneva Ruĝa Kruco“. La rifkabiloj havas nur du kuracistojn je sia dispono kaj posedas nur du ambulancojn. Ĉiuj klopodoj ricevi la necesan helpon, malsukcesis pro la energia kontraŭo de francoj kaj hispanoj, kiuj atentigas, ke Abd-el-Krim estas “ribelanto“ kaj pro tio ne rajtas ricevi helpon de la ruĝa kruco. Abd-el-Krim nun turnis sin per letero al la geneva komitato de la ruĝa kruco kun la peto tuj sendi helpon.

La tuta senhumaneco de la franc-hispana militmaniero per tio esprimiĝas. Ne sufiĉas militi per armiloj popolon, kiu ribelas kontraŭ la subpremado en kolonio, eĉ la helpo de kuracistoj de ruĝa kruco estas rifuzata al ĝi, kiu ne postulas alian, krom ĝia suvereneco.

Trad. *K. Vernike.*

Terura fervoja akcidento

Lundon, 24. Majo, vespere je la 10.15 okazis tre gravega fervoja akcidento. Antaŭ la stacio München-Ost atentis vagonaro la enirpermeson kaj tuj estis ekveturonta denove, kiam alia vagonaro de malantaŭe alveturis per rapideco 60-kilometra. La sekvoj estis teruraj: 27 mortigitoj dispecigitaj kruelege; 70 pli malpli grave vunditoj. La tutan nokton laboris militistaro, policistaro kaj fajrobrigadistoj kun sanitaristoj por savi la postvivantojn kaj vunditojn. La tuta urbo München estas kvazaŭ trafita en komuna doloro. Kaj la registaro kaj estraro de la fervoja kompanioj germanaj aranĝis pro funebro la flagadon duonmaste, por esprimi la kompaton al la viktimoj. Sed mi ne aŭdis, ke la opaj personoj, aranĝintaj tion, mem donis subvencion al la postvivintoj. Tion ili verŝajne translasas al ti-kiuj ĝis nun ĉiam montris la kunsenton. Per flagado oni ne povas eviti tiajn terurajn akcidentojn; sed nur per pli singarda oficigo kaj per malpli da maldungoj inter la fervojistaro. Jen vi povas vidi la burĝecan hipokritecon. *1810.*

Vivkondiĉoj de gelaboristaro en Italio

Ĉar multaj eksterlandaj k-doj demandas nin pri la ĉi tieaj nunaj vivkondiĉoj, tial ni verkis la jenan artikoleton; kaj samtempe ni sciigas, ke perpoŝta korespondado pri tiaj aferoj estas neebla.

Difini laŭcifere la vivkondiĉojn de nianaciaj gelaboristoj estas malfacile, pro la troa diverseco de la tuta medio en la diversaj regionoj de nia lando. Kaj tre malfacile — eĉ neeble — estas aranĝi precizan komparon inter la nuntempaj kaj la antaŭaj kondiĉoj; ĉar, dum ĝis 1922 la laboristklasaj organizaĵoj prizorgis statistikon pri la salajroj kaj la vivkostoj, post kiam ili estis detruataj, la faŝistaj sindikatoj plu nenion publikigis pri tiu temo, por ne evidentigi, ke la laboristkondiĉoj iĝis, pro ilia agado, malpli bona ol antaŭmilite, same rilate la salajron, kiel rilate la labortempon. Tial, ni nur pritraktos laboristajn kondiĉojn en nia urbo; ni atentigas tamen, ke la ĉi-tieaj kondiĉoj estas, kaj ĉiam estis, la plej bonaj el la tuta nacio.

Malmultvorte ni povas diri, ke, kiel la nianacia "porokhorlabora leĝo" estas pli ĝuste nomata "kontraŭokhorlabora", tiel ankaŭ la faŝistaj sindikatoj estas efektive "kontraŭlaboristaj" organizaĵoj.

Laŭ la "okhorleĝo", la industriisto rajtas postuli, ke oni laboru dum dek horoj, pagante la du lastajn per 10 % da pliigo de la ordinara pohora salajro. Nu, ĉar la ordinara salajro estas nesufiĉa por vivi, efektive la laboristo estas devigata labori dekhorojn; kaj, pro la nuna malplialtiĝo de la salajroj, por dekhora labortago oni ricevas nun malpli da mono ol antaŭe por okhora. Dum 1918—19, kiam la klasaj sindikatoj estis efektive almilitintaj la okhoran labortagon, en la daŭre (seninterrompe) laborantaj fabrikejoj oni anstataŭis la du podekduhorajn laborvicojn per tripookhoraj; sed nun, en multaj lokoj, kun silenta akcepto de la faŝistaj sindikatoj, oni realvenas al la du podekduhoraj.

Rilate la salajron ni diros, ke post la "fabrikejokupado" en aŭtuno 1920, la klasaj organizaĵoj nur penis defendi la ĝis tiam akiritajn salajrojn. La tuta faŝista kontraŭlaborista agado (bruligoj kaj rabadoj de la laborborsoj, fiagadoj ĉiamaniere subtenataj de l' industriistoj; ĉiaspecaj agadoj kontraŭ la estroj, la partioj kaj la homoj defendantaj la laboristaron) ĉiam malpermesis, ke la laboristaro ekbatalu por akiri pluajn plibonigojn, pro la malkuraĝiĝo kaj disiĝo kaŭzitaj de tiuj krimoj.

Plue, nur la "ŝajnaj" salajroj ne sanĝiĝis de 1920—1922; ĉar, pro la rapidega plialtiĝo de la vivkostoj, la akirpovo de tiu monsumo multe malplialtiĝis, kaj tial la "efektivaj" salajroj malgrandiĝis. Sed post 1922, t. e., post kiam la faŝistoj akiris la ŝtatestradon kaj la lab. klasaj organizaĵoj estis preskaŭ tute nuligitaj, tiam la posedanta klaso atakegis la laboristaron. La salajroj estis ĉie ege malaltigataj; la labortempo estis plilongigata per la supre diritaj rimedoj; la "internaj komisioj" (t. e. delegitaroj de la fabrikeja laboristaro) estis tute neniigataj; kaj, post kiam oni perforte disigis la malmultajn restintajn klasorganizaĵojn (de kiuj oni forprenis la tutan monon, la sidejojn, la meblaron kaj ĉiun havaĵon), nun oni efektive malebligis la vivon al ĉiu nefaŝista organizaĵo, per la "prisindikata leĝo" (vidu "Senn." n-o 68). En multaj metioj, la lab-istoj ne rajtas labori, se ili ne estas anoj de faŝista sindikato. Kaj nura tasko de tiuj sindikatoj estas, perforte envicigi la lab-istojn, por ke ili neniel povu agadi.

Pro ĉio supre dirita, depost 1922 ĝis nun, la "efektivaj" salajroj malgrandiĝis en nia urbo je 25—40 %, kaj plie en la aliaj partoj de la nacio. La potaga meza salajro de niaurba lab-isto estas nun 25—30 (paperaj) liroj; de lab-istino, 10—15 (unu pap. lir. egalas ĉirkaŭ 0,20 orajn lirojn aŭ svisajn frankojn): oni atentu tamen, ke laborsemajno enhavas nur sesoblan taglaboran salajron, ĉar dimanĉe oni ne laboras; kaj oni atentu, ke, kiel dirite, en ĉiuj aliaj urboj la salajroj estas pli malgrandaj.

Ni bedaŭras, ke pro la supre diritaj kialoj, ni devis esprimi la komparon inter la nunaj kaj la antaŭaj kondiĉoj de nialanda gelaboristaro pli per vortoj, ol per ciferoj: sed ni esperas, ke eĉ tia, nia raporto estu interesa por niaj eksterlandaj gefratoj. *ITAloj*

SENDU TUJ VIAJN ALIĜILOJN POR LA VI. SAT-KONGRESO

La afero de Niedra en Latvio

En Latvio oni ne konas pli faman nomon en la plej malbona signifo de la vorto, ol tiu de Niedra. Lia nomo estas sinonimo de la plej nigra reakcio kaj la vortoj "faŝismo" kaj "niedrismo" en nia lando estas samsignifaj.

Pastro laŭprofesie, li sin okupis ankaŭ pri politiko kaj estis verkisto talenta, sed tutan sian talenton kaj influon li uzis por kontraŭstari kaj subpremi ĉiujn novajn ideojn kaj movadojn. Kiel publicisto li defendis monarkismon kaj plej reakcieman sociordon, insultante laboristaron kaj ĝiajn gvidantojn. La sama ideologio trovis lokon ankaŭ en liaj verkoj. Post malsukcesinta revolucio en jaro 1905 li partoprenas persekutadon de malvenkitoj kaj en siaj predikoj kondamnas revolucion kiel krimegon kontraŭ dio kaj patrujo.

Alvenis la rusa revolucio, estis organizita latva nacia armeo, gvidata de agrarula registaro, kies revoluciemon oni ne povis eĉ suspekti, sed por Niedra eĉ tiu-ĉi registaro ŝajnis danĝera kaj li kun germanaj reakciuloj organizas novan registaron, kies ĉefministro proklamas sin mem, el disfalantaj restaĵoj de germana okuparmeo organizas sian armeon kaj entreprenas militiron kontraŭ ankoraŭ malforta nacia armeo kaj registaro, detruante la urbojn kaj mortigante laboristaron unuope kaj amase en interbuĉado.

Nur la komuna malamo kontraŭ Niedra kaj liaj reakciemaj intencoj donis venkon al nacia armeo, germanaj bandoj estis forpelitaj kaj Niedra rifuĝi sen Germanion, kie li restis ĝis la jaro 1924. Registaro deklaris lin ŝtata perfidulo kaj lia reveno ŝajnis neebla.

Sed forpasis nur kelkaj jaroj, dum kiuj vidvinoj kaj georfoj ankoraŭ ne sekigis larmojn, kiam la perfidulo subite revenis Latvion. Oni arestis lin kaj la popolo ne atendis venĝon, sed nur plenumon de justeco. Sed estis homoj, kaj ĝuste en regantaj partioj, kiuj jam forgesis la krimon de Niedra kaj sopiras pri forpasinta "stabila reĝimo" kaj klasdiktatoreco.

Kaj ekfunkciis diversaj risortoj por pravigi perfidulon kaj lian krimon. La tuta proceso estis transdonita el militjuĝejo al civitana, la lasta decidis liberigi arestiton kontraŭ grandsuma kaŭcio, kiun kolektis liaj "samideanoj". La plano ŝajnis sukcesonta, sed lia liberigo kaŭzis aron da protestoj kaj la parlamento decidis aresti lin denove. Fine li estis kondamnita je 3 jaroj da fortikaĵo, puno tre milda, ĉar ordinare eĉ ĉevalŝtelistojn oni punas pli severe. Sed la juĝistaro ja estas senpartia, estu nur ĝia decido plenumita.

Vere, nia nobelo restis en fortikaĵo duonon da puntempo, ĝis kiam sabate antaŭ pasko nunjara li estis tute sekrete liberigita, provizita per eksterlanda pasporto kaj "eksportita" Germanion. La tuto estis bone aranĝita, pri regnestra absolvo al Niedra oni eksciis nur el postpaskaj gazetoj, kiam li estis jam en Germanio. Absolvorajton de respublika prezidanto neniu pridubas — ĝi

estas laŭkonstitucia, sed popola indigno pro uzo de tiu-ĉi grava rajto al plej granda krimulo kontraŭ la tuta popolo estis granda. Multaj protestrezolucioj estis akceptataj en diversaj kunvenoj, postulante demision de prezidanto kaj tuta registaro. Kvankam la parlamento rifuzis interpelacion de soc.-dem. frakcio, la registaraj partioj mem malkonsentis pri ĉi-tiu afero kaj la ministraro demisiis.

Ni esperu, ke la nova registaro pli respektos la senton de popolo pri justeco.

Nemo.

Sciigoj el Svedio

Loĝantaro

La 31. Decembro 1925 la sveda loĝantaro estis 6053562 personoj. Plimultiĝo de l'loĝantoj dum la jaro estis 17444.

Landorganizacio

Prof.-laborista sindikatfederacio "Landsorganisationen" la 31. Decembro 1925 konsistis el 34 sindikatoj, kiuj kune havis 3810 sekciojn kun 384617 membroj. Plimultiĝo dum la jaro estis 24280 membroj. Estas nun en Svedio ĉirkaŭ 500000 gelaboristoj organizitaj en profesiorganizaĵoj. Ne ĉiuj organizaĵoj apartenas al Landorganizacio.

Kooperacio

Centro de la konsumkooperativoj "Kooperativa Förbundet" la 31. Decembro 1925 havis 315174 membrojn. Plimultiĝo dum la jaro estis 22705.

Labortago

Parlamento "Riksdagen" la 8. Majo ĉi-jare decidis plilongigi la provizoran leĝon pri okhora labortago ĝis fino de la jaro 1930.

Barbara leĝo

Malnova leĝo, kiu ekzistis depost jaro 1664 kaj "plibonigita" en jaroj 1723, 1805, 1833, por gedungitoj nun fine estas nuligita de la parlamento. Estis vere sklaviga leĝo. La pliampleksiĝanta laborista movado, en kiu la dungitoj trovas pli bonan ŝirmon, kaŭzis al ĉi-leĝo nuligon.

Malŝparo de mono

Parlamento subvenciis malavare per 50000 kronoj la kronprincon por reprezenti Svedion en Ameriko je malkovro de statuo de mondfama sveda inventisto John Eriksson. Ĉiuj komunistaj deputitoj, kelkaj socialdemokratoj kaj unu burĝo voĉdonis kontraŭ tiu decido. Kiam oni petas monon por helpo al senlaboraj laboristoj, tiam la parlamento estas pli ŝparema. La princo estas treege bone salajrata, sed laboristoj sen laboro vivas en mizero.

Elektrizo

Ŝtata fervojo inter la urboj Stockholm kaj Göteborg, longeco 457 kilometroj, nun estas elektrizita. La 15. Majo ĉi-jare ĝi en sia tuteco malfermiĝis por elektrovagonaroj. En Svedio troviĝas tiom da akvofaloj, ke el ties fortoj oni povas elektrizi ĉiujn fervojliniojn de la lando kaj restos tamen sufiĉaj elektraj fortoj abunde por la bezono al industrio, agrikulturo ktp.

994.

Statistika trompo

Antaŭ kelkaj jaroj oni faris enketon por eltrovi la nombron da mortoj en la malliberejoj po jaro. La statistikulo prenis la nombron de loĝantoj en la pundomo dum la jaro kaj ankaŭ la nombron, kiuj mortis tie.

Tiam li dividis la unuan per la lasta, kaj jen la rezulto. Tia logiko estas same kiel tiu de hotelestro, kiu fanfaronas pri la sanonivelo de lia domo kompare al aliaj en la urbo, pro la fakto, ke dum la jaro li gastigis mil homojn el kiuj nur unu mortis. Dum la mortnivelo por la urbo estis dekdu po mil loĝantoj. Laŭ tia logiko la franca ministro deklaris, ke la pundomo estis la plej sana loko en la mondo, dum la angla inspektoro grave konfirmis, ke estis malmultaj lokoj kie homoj tiom rapide formortas, kiel en bone kondukita pundomo.

3398.

Kiamaniere oni disvastigas la fiburĝgazetaron en Bulgario

En la regiono t. n. Nova Bulgario la popolo estas malriĉega, konsistanta de enmigrintoj el Turkio kaj Grekio. Ĝi estas en sia preskaŭ plimulto loĝata de senalfabetuloj aŭ malkleruloj — bonega kondiĉo por la fiagoj de l' burĝaro. Oni utiligante ĉi-kondiĉon, vagadas de vilaĝo al vilaĝo organizistoj de l' reganta klaso "Demokr. Kunsento", legitimitaj de l' centrejo de "Dem. Kuns.", ke ĉiu oficestro al ili kunhelpu por aboni kiel eble plej multajn homojn por la organo "Dem. Kuns.". Alvenas komunumejon ĉe sekretarikasisto-(sekretario impostisto) enpenetras kun la nomaro de l' oficistoj en la komunumejon, de kampgardistoj ĝis vilaĝestro, kiuj senescepte devas aboni. Ĉe la demando kial? oni respondas nur: "Laŭ ordono de *Supre* (de l' centrejo) ĉiuj bulgaraj oficistoj devas esti abonantoj de l' organo "Dem. Kuns.". Se iu provas sin retiri, kontraŭdiri aŭ nei, aŭdas: Subskribu kvitancon ke vi neas, ĉar mi prenas noton kaj kiam mi iros *Supren* mi faros, kion oni devas fari. Per similaj timigoj, mensogoj kaj aliaj oni forprenas de ĉiu oficisto po 300 lev. por tutjara abonpago! Ankaŭ oni forprenas de la komunumejrekompenco instruista po saman sumon, sen ilia konsento eĉ sen ilia scio! La instruisto ekscias ĉi tion nur kiam li iras por ricevi la salajron. Anstataŭ monon, ili ricevas kvitancojn. Similmaniere oni abonas la turkojn, kiuj okupas iu ajn oficon en la komunumejo, kiuj ne povas paroli, skribi kaj legi bulgarlingve.

Jen vi vidas oficiston maljunan kun kelkmembra familio, kiu ricevas salajron nur, ke familianoj ne mortu de malsato, kurbiĝinta kaj preskaŭ larmiĝinta per tremantaj manoj donas 300 lev! krom tio aliajn dekojn por similaj perfortaĵoj k. a.! Je la fino de l' monato oni subskribas kalkulkajerojn por grandcifera salajro, kaj ricevas malgrandan realaĵon! Anstataŭ alporti vivnecesaĵojn al siaj familianoj, oni montras al lastaj peceton da paperaĉo surkolorigita per inko kaj stampilo de l' organizaĵo reganta.

Jen karaj tutmondaj k-doj, kiamaniere oni disvastigas sian fiburĝgazetaron! . . .

Julo 4100

Socialistoj, ni socialigu!

La idiomo

Ni, la socialistoj opinias, ke ankaŭ la kulturo devas esti socialigata, farante ĝin universala, ne sekta kaj etendante ĝin al ĉiuj sen preferoj.

Ni baziĝas, por subteni tion, sur la samaj principoj, sur kiu ni bazas la konvenon socialigi la produktilojn kaj interŝanĝilojn: principoj de egaleco kaj justeco montrantaj la devigon, disvastigi la kulturon al ĉiu, sen privilegioj kaj sen antaŭjuĝoj naskitaj el eraroj kaj malamoj, kaj ekonomiaj principoj de intensigo en la produktado, kiuj, de ĉi tiu vidpunkto, konsilas formeti la sektismon, ĉar ĝi estas tro partia, tro difekta kaj tro netaŭga por doni fruktojn maturajn, kaj kulturi ĉies cerbon, por ke ĉiu opulo produktu sian plejeblaĵon.

La lingvoj, fortaj iloj de kulturo, bazo de ne malgranda nombro da ĝiaj manifestiĝoj, ne restas ekster ĉi tiu ĝenerala leĝo. Kompreneble, socialigi ilin ne signifu, fandi ilin en unu, nuliganta ĉiujn kaj akiranta la monopolon de superviveco. En neniu kultura fako ni komprenas tiel la socialigon, kiel unuigon, identigon je unu tipo. Ni ne pretendas anstataŭi la religiojn per alia universala, sed disvastigi principojn ĝeneralajn de etiko, kiuj igu nin ĉiujn respektemaj kaj toleremaj al la intimaj personaj konvinkoj; ni ne probatalas por leĝaro tutmonda, sed por kodo de bazoj, servantaj ĉie kiel savgardo por la vivo kaj indeco. En neniu rilato ni proponas monotonan unuformecon: sufiĉas al ni krei altan nivelon de nobla kunfrateco, de interkonsento respektplena al la diverseco, kiu faras bela kaj alloga la vivon.

Do, socialigi la lingvojn signifus limigi la naciajn je ilia grupopa rolo kaj utiligi por la internacia vivo unu neŭtralan, taŭgan, simplan, teknike perfektan.

Kiel en ĉiuj aferoj kulturaj kaj teknikaj, ne temas ĉi tie eltiri ion el nenio, sed science laborante elekti la plej internaciiĝintajn elementojn de la nunaj idiomoj kaj unuigi ilin per kelkaj simplaj reguloj.

La laboro estas farita; ĝia rezultaĵo estas Esperanto.

Adopti ĝin alportos, kiel ĉia socialigo, evidentajn moralajn avantaĝojn: la internaciaj rilatoj pliampleksiĝos, intensiĝos kaj ili tenos sin sur plano de rajta egaleco, sen ies humiligoj nek motivoj de fiereco; ĉe tiaj rilatoj malaperos la eĥoj rememorigantaj la sektojn, por ke aŭdiĝu nur la neŭtrala voĉo homara de ĉiuj kaj de neniu. Kiel la alpreno de ĝenerala etiko, de internacia kodo, de universalista

kriterio libera de antaŭjuĝoj en la instruado, tio starigos novan etapon en la kulturprogreso homara. La nova popolo internaciista, kerno de la estonta konscia homaro, komenciĝos ekvivi per propra vivo, kiam ĝi ekparolados per propra voĉo.

Teknike la avantaĝoj adopti la internacian lingvon supozigas progresimpulson nekalkuleblan. Laŭ ekonomia vidpunkto ĝi supozigas en sia kreditkonto la ŝparon de multaj jaroj da laboro uzitaj de miloj da personoj por la studado de kelkaj idiomoj; la forigon de armeo de perulo, interpretistoj kaj tradukistoj, kiujn necesigas la plej rudimenta agado internacia; la eviton de la multoblaj elspezoj por eldono de libroj en diversaj lingvoj, ĉar sufiĉos ĝin fari en unu sola, por ke ĝi estu legebla de ĉiuj; certe, la faciligoj, kiujn tio supozigas por komerco, industrio kaj sciencaj kaj artaj rilatoj, estas nekalkuleblaj.

Ni socialistoj do estas, pro doktrinaj principoj, devigataj enkonduki la uzadon de Esperanto en la kulturinstitucioin internaciistajn, kiel ankaŭ en niajn ĝeneralajn rilatojn eksternaciajn. *Francisko Azorin.*

La problemo de reguligata infanproduktado

Post la internacia kongreso en New-York pri kontrolo de infannaskiĝoj (en pasinta jaro 1925) estis fondita internacia ligo de neomaltusanoj por reguligo de hompliiĝado. Okaze de tiu kongreso, popola komisaro por san-protektado en Sovetio k-do Semaŝko eldiris dum intervjuo kun ĵurnalistoj jenan opinion:

La movado de Malthus-anoj, kiu celas malpliigi la kreskantan nombron de infannaskiĝoj per ŝtata regularo, estas ripete organizata de eŭropa burĝaro. Oni memoras, ke Malthus per sia teorio tendencis determini la "feran" leĝon pri la laborpago depende de kvanta kresko de loĝantaro, t. e. malthusanoj asertis, ke por fiksi stabilan nivelon de salajroj oni devas ne atenti pri klaslukto, sed konscie limigi la naturan proceson de hompliiĝado.

Tiu ĉi abomena burĝa teorio estas refutita per la tuta historio de klaslukto, kiu nur per konstanta atakado kontraŭ fundamento de kapitalismo helpas al laboristoj plibonigi sian staton. Malnova malthusismo nun reaperas sub masko de neomalthus-ismo, kiu ne pretendante ŝanĝi la leĝojn de ekonomia evoluo celas nur "kontroli" kaj "reguligi" infanproduktadon. La unua lando, kiu organizis tiun kontrolon en pli-malpli granda skalo, estas Usono. Tie burĝaj eŭgenistoj (t. e. plibonigistoj de l'homo) laŭ sciencaj principoj de eŭgeniko obtenis en multaj ŝtatoj specialajn leĝojn pri... kastrado, unuavice al krimuloj kaj kelkaj ŝtatoj, eĉ kastradon al politikaj ribeluloj. Sub la scienca masko de eŭgeniko, la defendantoj de privatula posedrajto por produktiloj, tendencas per tiaj rimedoj sekurigi la propraĵojn de l'burĝaro. Nenian novan movadon organizas la ĵus fondita ligo. Ĝi same pretendas protekti infan-pliiĝon ĉe riĉa burĝaro, sed malkreskigi ĝin en proletaraj masoj kaj ĉe politikaj kontraŭuloj. La nova argumento de burĝaj eŭgenistoj nun estas nur la aserto, ke la tutmonda milito okazis kaŭze de "troa hompliiĝo". Kiajn naivulojn celas trompi tiuj hipokrituloj?

La proletaro en tiu ĉi demando restos sur sia vojo, — konklude diris k-do Semaŝko. — Ne kastrado, ne kontraŭgravedaj protektiloj, sed obstina luktado kontraŭ la burĝaro por ruinigo de kapitalismo kaj reĝimo de ekspluatado, — jen estas la vojo de proletara eŭgeniko...

Al la bonega kritiko de burĝaj tendencoj pri tiu ĉi demando, kiun faris k-do Semaŝko, oni ne bezonas ion aldoni. Ĉiu klaskonscia proleto konsentos lian opinion. Tamen, la abstraktigo de l'demando, kiun li faris ignorante la praktikajn problemojn en la kondiĉoj de Sovetio lasas ĉe ĉiu leganto multajn "sed'ojn" sen respondo.

En Ruslando estas venkita ekonomia potenco de l'burĝaro, detruita la fundamento de kapitalismo; tamen la nova sociordo dume ne montris sin tute kapabla garantii al rusaj laboristoj la necesan nivelon de sufiĉa bonstato kaj la demando pri reguligado de infan-naskiĝoj fariĝis same solvenda kiel en la burĝaj landoj. Pro la ekonomia mizero de laboruloj la registaro estis devigita permesi la abortojn. Ĉe ŝtataj organoj por san-protektado estas organizitaj specialaj "Abortaj komisionoj", kiuj en certaj kondiĉoj permesas al gravedulinoj aborti en ŝtataj kuracejoj.

Tamen ne ĉiu virino, en karakterizaj por Sovetio kondiĉoj de seksa maldisciplino, kuraĝas sin deklari por legala aborto; tial la sekretaj abortoj estas pli oftaj kaj fariĝis la kutimo de preskaŭ ĉiu urbana virino.

Krom tio oni ne povas malatenti, ke kaŭze de l'milito la socio nun havas pli multe da degeneruloj, venermalsanuloj kaj da homoj kun difektitaj psiko kaj nervoj. La eŭgenistoj devas obteni, ke la nova generacio estu pli sana kaj tiucele oni devas protekti la socion kontraŭ la natura danĝero, kiun kreas la heredaĵo de nomitaj difektuloj, se oni lasas al ili laŭvolan rajton havi la infanojn. Tamen, eĉ ignorante tiujn ĉi motivojn, ni ne devas forgesi pri la kialo, kiun eldiris dum iu disputo pri seksa demando rusa profesoro Ĉernjaĥovski:

— Tute maljusta estas postuli, ke la virino pli ol unu fojon nasku la infanojn. La patrineco ĝenerale estas necesa por sana korpevoluo de l'virino, tamen ĝi estas permesebla, se la virino havas sufiĉe da fortoj por naski kaj eduki. La virino devas havi ankaŭ la rajton vivi laŭ persona plaĉo kaj la scienco devas helpi al ŝi por sen malutili ŝian sanon, por eviti oftan gravedecon.

Nun la scienco jam havas kelkajn pozitivajn atingaĵojn. La eksperimentoj jam pruvis, ke la injektado de vira spermo en la sangon de virina korpo por certa periodo evitigas la gravedecon.

La sociala revolucio liberigos la proletaron el ekonomia sklaveco: per helpo de l'scienco ĝi liberigos la laborantan virinon ankaŭ el la fiziologia sklaveco. Tiudirekta devas esti la vojo de proletara eŭgeniko. *3637.*

LA REDAKCIO
ATENDAS MANUSKRIPTOJN PRI LABORISTA MOVADO, LABORISTA ESPERANTO-MOVADO KAJ VIVKONDIĈOJ, PRECIPE EL NORDAJ LANDOJ (DANIO, NORVEGIO, HOLANDO KTP.), OKCIDENTAJ KAJ TRANSMARAJ LANDOJ

Edukado kaj milito

Nia plej granda sopiro, post longaj militoj de jarmiloj, post la mortigado de frato kontraŭ alia frato, sen ia ajn kaŭzo estas, ke ni atingu tiun tempon en kiu eterna paco regos la tutan mondon. Tiun-ĉi ni povas atingi sen armeo, sen sangsoifanta homa povo, sed nur per la homa sento kaj penso. Vidu nur gefratoj, inter la homaro estas 90 % pacemaj kaj vidu nur kiel ili agas kontraŭ si mem kaj kontraŭ siaj sentoj.

Kiam la gepatroj edukas siajn infanetojn, ĉiu volas, ke ili estiĝu bonuloj, bel- kaj bonpensaj homoj. Kiam la knabo (ĉar mi volas nun nur priskribi la knaban edukadon) estiĝas 5 jara, li ricevas — se nur unu ebleco estas — lignan ĉevalon, kaskon, sabron, pafilon kaj aliaĵojn por ludi militon kaj eĉ la gepatroj rakontas al la infanetoj pri milito, pri batalo. En la infana penso tiu ĉi ja estas bela, ĉar la gepatroj tion tre bele rakontas kaj la aĵoj ankaŭ tre plaĉas al li. Estas interese al knaboj, kiuj ankoraŭ ne povas kompreni, kion signifas milito, ili konas la militon nur el la rakontoj de la patrino, kiu tre bele tion rakontis kaj nur la belaĵojn (se estas eĉ unu belaĵo en la milito) ŝi rakontis. La knabo ne komprenas, kion signifas milito, morto, ploregо, mizerego kaj denove mortigado, li ne vidas la doloron de l'vidvinoj, la ploregon de la orfoj, la mizeregon de l'laborista homaro, kiuj ordinare plej grande sentas la militon, li nur vidas la belaĵojn kaj ludas militon. Kaj la gepatroj tion vidas kaj ridas pri siaj infanoj.

Gepatroj! Komprenu jam, ke via tasko estas eduki la infanojn, eduki je bonaĵoj kaj komprenigi ilin kiam ili estas infanetoj, ke la plej granda teruraĵo sur tiu ĉi mondo estas la milito kaj ne militludilojn aĉetu por ili, sed rakontu belajn historiojn pri la homamo kaj paco — kaj tiam, sed nur tiam vi povos konstati, ke baldaŭ venos nia sopirata tempo kaj nia tasko estos plenumita kaj paco regos la mondon.

Eduku bone la infanojn kaj kun ili la junularon, nur ili posedas la estonton!

Vivu la mondpaco!

Eŭgeno Benedikt (6913).

≡ RADIO ≡

Multaj k-doj dezirantaj starigi ĉe si Radio-akceptilon staras antaŭ problemo: kian skemon preni, kiel bazan? Unue, mankas mono por fari grandajn akceptilojn. Due, estas tiom multe da mikro-, kristad-, geterod- kaj diversaj -din-skemoj, ke oni ne scias kian preni.

Mi mem eksperimentis kaj devas diri, ke plej bonfunkcianta kaj donanta akran akcepton estas regenerativ-akceptilo kun unu mikro- aŭ katodlampo. Preskaŭ ĉiu k-do scianta iomete Radio-teknikon, povas konstrui tiun-ĉi akceptilon.

Necesas por ĝi: 1 variebla kondensilo je 500 cnt., tri aŭ du bobenoj, du blok. kondensiloj je 200 kaj 2000 cnt., unu krada rezistanco, unu reostato, 1 lampo kaj telefono je 2000 ω.

Por ke akcepto estu pli akra, oni devas kontakti unu varieblan kondensilon je 300—500 cnt. al anod-bobeno.

En Kremenĉugo kun ĉi-aparato ni aŭdas rostovan, odessan, ĥarkovan, kievan kaj moskvan brodkastajn staciojn. Vespere, plej bona tempo por Radio-amatoroj, ni aŭdas Kenigvusterhausen (Germanio) kaj Laventri (Anglio). *I. Avrunin*, Kremenĉug

≡ DISKUTEJO ≡

Al la artikolo de k-do Fröding

Pro troa okupado mi ĉiam prokrastis aldoni ankaŭ mian spertadon "inan" pri la vegetara nutraĵo. —

Antaŭ la mondmilito mi havis la kutimon manĝi multe (preskaŭ multe) da viando kaj mi konfesas, kvankam mi estis pli dika ol nuntempe, mi ne bone fartis.

Dum la mondmilito oni devis vicigi sin por ricevi iom da viando kaj mi pripensis, pro kio stari du aŭ pli da horoj pro tiom malmulte da viando! Mi rezignis ĝin — kaj unufoje mi ne manĝis viandon dum kelkaj monatoj, ĉiam atendinte ekmalsaniĝon. Sed male, mi pli bone ekfartis ol miaj konatulinoj, kiuj manĝis viandon . . .

Post la renverso mi denove manĝis viandon, sed mi rimarkis, ke mi ne pli satiĝis ol sen viando. Depost tiam mi kuiris viandon tre malofte, unufoje po semajno. Kolbason mi tute forlasis. Dum tiu tempo mi ankaŭ fariĝis alkohol-abstinenca kaj iom post iom mi ĉesis manĝi "kadavrojn".

Ĉirkaŭ antaŭ unu jaro mi parolis hazarde kun viena k-do pri la vegetara problemo. Li pruntedonis al mi librojn pri tiu temo, ekzemple de "Hindhede" kaj "Malsaneco kaj acida-morto (Säuretod)" k. a. Nuntempe mi legas avide kaj entuziasme de "D-ro Drews pri natura nutraĵo, dediĉita al la mizero" kaj "sango kaj frukto" de Schlickeysen, kaj mi nur povas deziri, ke iu sperta k-do traduku tiajn grandiozajn verkojn en nia kara lingvo, por ke ili ne nur estu legotaj de la germane aŭ angle parolantaj gek-doj, sed de ĉiuj Esp-istoj.

Mi nur konsilas al ĉiu nur iom prudentulo, ke li okupu sin kun tiu gravega afero kaj kun iom da volo li certe pli bone fartos ol antaŭe, ĉiam uzante alkoholaĵojn, tabakon kaj viandaĵojn! Ekzistas ankoraŭ aliaj pli taŭgaj ĝuegoj ol tiuj venenoj.

Estas ne eble en letereto pritrakti tian problemon, sed ĝi estu nur instigo samkiel tiu artikolo de k-do Fröding. —

Per miaj vortoj mi turnas min precipe al k-dinoj, ĉar, se unue la inoj estos konvinkitaj pri la graveco de l' vegetara nutraĵo, ili certe povos bone influi la virojn, "la sinjoroj de kreado".

La progreso kultura de familio, ŝtato, klaso kaj de la tuta mondo dependas nur de "Ni", inoj prudentaj!

Stephi Müller, Wien.

INTER NI

Diri, ke esperanto estas facile ellernebla, estas gravega eraro. Mi asertas, ke ĝi estas pli malfacila ol iu ajn alia lingvo.

— Paradokso! . . . Absurdo! . . .

— Eble, sed almenaŭ bonvolu atente pripensi jenon: Unu el la ĉefaj trajtoj de l' artefarita lingvo estas ĝia LOGIKECO. Sed en preskaŭ ĉiuj niaj faroj ni agas nelogike. Ni obeas kutimojn, tradicion, morojn, leĝojn, kiuj havas nenion komunan kun logiko.

Tiu nelogikeco reflektiĝas en la naciaj NATURAJ lingvoj, kiujn ni jam akiris senlerne ĉe la brusto de nia patrino. Tute nature ni uzas nelogikajn esprimmanierojn. Kaj se ni lernas fremdan nacian lingvon, ni trovas en ĝi similajn nelogikaĵojn, kiel tiaj ekzistantaj en nia gepatra. Tial nia spirito troviĝas kvazaŭ en konata regiono kaj alkutimiĝas.

Sed esperanto devigas nin senĉese obei logikon, se ni volas paroli korekte kaj ne nur pli malpli kompreneble. Tia penado al stila logikeco en esperanto estas kontraŭnatura, malfacila kaj sekve neniam absolute sukcesa.

Neniam mi, vi, ni ĉiuj kapablos tute perfekte uzadi esperanton. Kapablus fari tion nur ĝisostaj sennaciuloj, t. e. homoj nun ne ekzistantaj.

Ni do konsciu pri niaj mankoj. Estas la unua kondiĉo atentenda, se ni volas almenaŭ progresi sur la vojo al nia mensa sennacieciĝo.

Konsekvence, ne diru al viaj lernantoj, ke nia lingvo estas facile ellernebla. Diru prefere, ke ĝia daŭra, senĉesa lernado estas nepre necesa helpilo por nia mensa liberiĝo, por nia propra memkulturo. Diru, ke oni tre facile kaj rapide povas interkompreniĝi per esperanto, sed ke necesas multaj jaroj nur por ekvidi, ke nuntempe neniu homo funde scipovas la artefaritan lingvon.

Esperanto, la sennacieca lingvo estas ankoraŭ nun en vindo. Ĝi firme kaj NATURE povas malvolviĝi nur kiam ekzistos sennacieca popolo.

Malproksima la celo. Sed ne laciĝos la pioniroj.

Iuelie.



VIa SAT-KONGRESO EN LENINGRAD

5.—10. Aŭgusto 1926

4. KOMUNIKO

KONGRES-KOMITATO

Gek-doj: *Koĉkin, Lisicin, Podkaminer, Semjonova, Urban.*

KORESPONDADRESO:

K-do S. Podkaminer, Petropavlovskaja 4, kv. 34, Leningrad — Sovetio.

KOTIZO: Egala al la jara SAT-kotizo.

ALIĜILOJ

Skribu la nomon, antaŭnomon, adreson, profesion, partitendencon, n-o de SAT-matrikulo, aktiva aŭ pasiva, membrecon.

Sendu aliĝilojn kaj kotizojn al:
k-do R. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstrasse 1.

Sovetiaj gek-doj sendu al k-do *S. Podkaminer* laŭ supremontrita adreso.

Antaŭajn komunikojn vidu en n-roj 29, 32 kaj 34 de "Senn."

Kongresaranĝoj: Estos organizataj: Koncert-vespero kun partopreno de diversaj laborist-artaj klubrondetoj; konkurso de esp. murgazetoj kaj ekspozicio de laboristaj murgazetoj.

Kelkaj eksterlandaj k-doj petis aranĝi sportkonkursojn inter sportistoj-kongresontoj kaj rusaj sportistoj. Tial K. K. petas ĉiujn gek-dojn, dezirantaj partopreni ĉi-konkurson, senprokraste komuniki al K. K. pri ĉi-deziro.

Ĝis nun estas ricevita propono pri aranĝo de vegetara kaj kooperativa fakkunsidoj. Partoprenontoj registriĝu ĉe K. K.

Ĝoje ni konstatas, ke malgraŭ la multekosta vojaĝo gek-doj streĉas fortojn por veturi al kongreso.

Ĉiujn prezojn ni komunikas en germanaj ormarkoj.

Ŝipveturo de	Stettin	80 m.
„ „	Hamburg	100 „
„ „	Stockholm	40 „
„ „	London	200 „
„ „	New York	640 „

(Certe nur unu flanken, en kajuto kun littolaĵo kaj kun manĝado.)

Fervojveturo (tra Berlin kaj Riga)

de Berlin	114 m.
„ Vieno	156 „
„ Paris	162 „
„ Bruxelles	150 „

Ĉi-prezoj estas de vagonaro, kiu veturas de Berlin ĝis Leningrad *rekte* kaj de Riga oni veturas per aliaj vagonoj.

Se gek-doj volas havi la prezmalpliiĝon je proksimume 10 %, ili prenu biletojn nur ĝis *Ostrov* (latva-rusa limo) kaj tie ŝanĝu la vagonaron.

Vizoj: Veturantoj per ŝipo bezonas (krom germana pasporto) sovetan vizon. Ĉi-lasta estos senprokraste donata en ĉiuj sovetkonsulejoj post montro de la kongreskartoj sendotaj dum Junio.

Ĉi-vizo kostas 22 m. kun la retroveno. Nun ni klopodas pri senpagaj sovetiaj vizoj aŭ almenaŭ multe rabatitaj. Do ĉi-lasta elspezo ŝajne estos nuligata aŭ multe malpliigita.

Veturantoj per fervojo bezonas ankaŭ latvian transiran vizon, kiu kostas 24 m. kun retroveno; ricevebla en latviaj konsulejoj.

Loĝejo: Senpaga por ĉiuj alveturontoj.

Manĝado: Multe rabatita, ne pli ol 2 m. potage por bona manĝo.

Ĉefaj fervoj-linioj al Stettin. Por eviti multan korespondadon, ni ĉi-sube sciigas la veturkostojn de kelkaj ĉefurboj *al Stettin.* La prezoj kompreniĝas per rapidvagonaro 3-a klaso. Personvagonaro 4-a klaso po km kostas 3,3 pfenigojn.

km	urbo	prezo
135	de Berlin	7,80 m.
300	„ Leipzig	16,50 „
314	„ Dresden	17,30 „
674	„ Frankfurt a. M.	35,30 „
711	„ Köln a. Rh.	37,10 „
972	„ München	50,50 „

Ĉiu ekster-sovetiano bezonas pasporton, kiun li devas havigi al si en sia urbo, ĉe la pasport-oficejo aŭ policejo. La pasporto kostas en Germanio 8,— m.

P. S. Kiel vi vidas, la plej rekomendinda pro oportuneco kaj malkareco estas la vojo de Stettin (vaporŝipe); do, germanaj k-doj organiziĝu, por komune ŝipveturi!

2. listo de aliĝintoj al la VI. SAT-Kongreso

20.	K-do	Nikolskij, R., Smolensk	5241
21.	K-dino	Nikolskaja, A., „	6798
22.	K-do	Artemjev, P., Nalĉik	1080
23.	„	Kuharskij, P., Samara	5913
24.	„	Astafjev, P., „	4605
25.	„	Puantis, J., Smolensk	——
26.	„	Puantis, L., „	——
27.	„	Lapenko, K., Vitebsk	3616
28.	„	Lebedev, A., Kimry	3708
29.	„	Muravkin, H., Berlin	2921
30.	„	Roth, J., Frankfurt a. M.	130
31.	„	Mahns, R., Röntgental	1013
32.	K-dino	Wernicke, J., Leipzig	6722
33.	K-do	Wernicke, K. „	5684
34.	„	Klopfleisch, P., Düsseldorf	920
35.	„	X. en Y.	6093
36.	„	Sterzenbach, W., Essen	4567
37.	„	Scheder, J., Seifhennersdorf	6201
38.	„	Lerchner, R., Leipzig	90
39.	K-dino	Lerchner, S., „	2465
40.	K-do	Stoecker, J., Düsseldorf	921
41.	„	Adamson, E., Göteborg	902
42.	„	Schott, K., Langenfeld	4362
43.	„	Scherbaum, H., Gr.-Schönau	1378
44.	„	Rösch, K., Stuttgart	4398
45.	„	Endress, O., „	4391
46.	„	Waller, K., „	4392
47.	„	Götze, F., Altenburg i. Th.	5569
48.	„	Bässler, O., Leipzig	715
49.	K-dino	Bässler, F., „	2276
50.	K-do	Gültling, A., Hamburg	3432
51.	„	Nestroy, W., Dohna	3787
52.	„	Barthelmess, N., Berlin	1768
53.	„	Beljakov, V., Tuapse	3935
54.	„	Sergeev, A., Kazalinsk	6932
55.	„	Demidjuk, G., Moskvo	1516
56.	K-dino	Demidjuk, M., „	1521
57.	K-do	Drezen, E., „	1518
58.	„	Flejss, E., Vjatka	——
59.	„	Sadykov, H., Novoĉerkask	6358
60.	„	Ŝubin, P., Sverdlovsk	6937
61.	„	Nikoloviĉ, B., Leningrad	——
62.	„	Lebedev, V., Ivan.-Voznesensk	4696
63.	K-dino	Zavadskaja, Z., Leningrad	6476
64.	K-do	Zavadskij, V., „	6475
65.	„	Kozorez, V., „	6067
66.	„	Savvin, I., Sartana	4420
67.	„	Varankin, V., Tverj	1116
68.	„	Smirnov, P., Omutninsk	6560
69.	„	Klys, J. Minsk	4104
70.	K-dino	Klys, A., „	5056
71.	K-do	Snejko, D., „	603

Urĝa informo

por atento de la partoprenontoj la VI. SAT-Kongreson

Multaj k-doj informiĝas, ĉu estos iel rabatitaj la vojaĝelspezoj al Leningrad por partoprenontoj de nia VIa Kongreso.

Moskvaj k-doj insiste klopodas ĉe koncernaj registaraj kaj laboristaj organizaĵoj, ke la vojaĝo estu malkarigita, por ke plejmulto povu partopreni la kongreson.

Rilate la veturadon kaj restadon en Leningrad oni esperigis nin, ke estos farita ĉio ebla kaj ke la veturado estos rabatita. Pri la definitivaj rezultoj de la klopodoj estos tuj post ilia atingo komunikita per "Senn."

Rilate la vizojn garantii rabaton por ili ne estas provizore eble. Ĝis nun vizitintaj Sovetion laboristaj delegitaroj ne estis ricevantaj rabatojn por la vizoj, tamen moskvaj k-doj insiste klopodas ankaŭ tiudirekte. Dume la rezultoj definitivaj estas ricevitaj rilate plifaciligon en ricevo de la enveturvizoj. La afero estas aranĝita tiamaniere, ke popolkomisaro por eksterlandaj aferoj sendos al konformaj ambasadorejoj ordonon, por doni vizon al ĉiu kongresonto laŭnome. *Tial estas tre grave,* ke ĉiu partoprenonto jam tuj sendu sian kongres-aliĝilon, por ke la informo pri vizo por li ne malfruu ĉe koncerna ambasadorejo.

Krom la demandoj, metitaj en la aliĝilo, *nepre* kun la aliĝilo mem devas esti sendataj jenaj informoj:

1. Devas esti montrita ne nur loĝlando, sed ankaŭ la naskolando.
2. La jaro de naskiĝo.
3. Ĉu k-do antaŭe vizitis jam Sovetion kaj kiam?

Foresto de ĉi-informoj prokrastigos ricevon de envetur-vizo.

Do neniu plu prokrastu kaj tuj sendu sian aliĝilon kun la montritaj aldonaj informoj!

La aliĝiloj devas esti sendataj nur al Leipzig aŭ Paris.

G. Demidjuk.

Postkongresa karavano

(Ekskurso en N.-Novgorodon post la VI. SAT-kongreso)

N.-Novgoroda SAT-grupo kune kun N.-Novgoroda Gubernia Filio de SEU organizas komunan veturon al SEU kaj SAT-kongresoj kaj invitas ĉiujn gek-dojn, trapasontaj N.-N-on, partopreni ĝin.

Krom tio estas organizata postkongresa ekskurso (karavano) de SAT-kongresanoj al N.-Novgorod. Dum la lasta la gek-doj havos unikan okazon viziti la tutmonde-konatan N.-Novgorodan foiron (kies malfermo estas la 1. Aŭg.) kaj ĝui belan aspekton de la plej granda rivero en Eŭropo Volga kaj de ĝiaj pitoreskaj bordoj. Ankaŭ oni organizas vizitojn de diversaj industriaj kaj aliaj institucioj laŭ deziro de l' partoprenontoj.

Projektata direkto de l' karavano en N.-Novgorodon estas jena: Leningrad—Ribinsk (Rybinsk) fervoje, Ribinsk—N.-Novgorod vaporŝipe sur Volga, poste N.-Novgorod-Moskvo aŭ alien laŭ deziro de la revenontoj.

Tial ni esperas, ke eksterlandaj SAT-anoj multnombre partoprenos la ekskurson, des pli ke tiu-ĉi ekskurso havos tre grandan propagandan signifon, pruvante la praktikan utilecon de Esperanto kaj montrante la interfratiĝon de l' tutmonda proletaro.

Detalaĵoj pri la tempo de veturo, kosto ktp. sekvos en dua letero. Ĉiuj gek-doj intencantaj partopreni la komunan vojaĝon al la kongreso kaj la postkongresan ekskurson bonvolu plej baldaŭ komuniki pri tio, por havi la personan kunligon, al Hermann Konovalov, Teatralnaja pl., d. n-o 6, loĝ. n-o 9 Nijnij-Novgorod, Sovet-Unio.

Sennaciece *Organiza komitato.*

Demandoj kaj Respondoj

(Fako proponata, kiu povas koncerni plej diversajn problemojn kaj esti respondotaj kiel de la redakcio same de aliaj k-doj.)

1. Kia estas nuntempe la stato de projekto de profesoro Openhejmer (el Berlina universitato) pri Terlaboristaj Kooperativoj? 2. Ĉu la kolonio Merĥavjo en Palestino ĝis nun konservis la Openhejmer'an statuton? 3. Ĉu ekzistas aliaj samaj kolonioj? 4. Kie nuntempe loĝas prof. Openhejmer? 5. Ĉu oni povas skribi al li esperantlingve? Mi intencas organizon de kooperativa sekcio (fako) dum la VI. SAT-kongreso en Leningrad kaj supreŝomitaj sciigoj al mi estas urĝe necesaj.

Ja. Ĥ. Brukson (1896).

EKSTER NI

En unu el la lastaj n-roj de SENNACIULO, estas riproĉite al la aŭstriaj esperantistoj laboristaj pro tio, ke ili eldonas gazeteton, kies ekzisto ŝajnas malnecesa. Nu, ĉu mire ne estas konstati, ke eĉ la recenzisto de la organo de UEA same riproĉas. Jen legu:

"La lab. esperantistoj spertas saman disigon de fortoj kiel la t. n. "neŭtralaj" samideanoj. Pri la bezono de speciala gazeteto AŬSTRIA LABORISTO ESPERANTISTA povas dubi vidante, ke ĉiuj gazetoj esp. luktas por ekzisti. Alia konstato estas, ke eĉ la plej internaciemaj aŭ SEN-NACIAJ esperantistoj ne sukcesas venki la plej danĝeran bacilon de organizita movado: la partikularismon.

Quousque tandem?"

Ĝis kiam vivos tiu danĝera bacilo (?) demandas la recenzisto.

La partikularismo, t. e. la emo malatenti la komunan intereson, ĉiam ekzistis, kaj verŝajne neniam malaperos.

Ĉu tia konstato estas sufiĉa motivo por fariĝi malbonhumora kaj pesimista? Ne, tute ne. Ĉagrena mieno utilas neniel. Prefere permesu, ke mi rediru al vi biblian — do veran — rakonteton:

Iam dio ordonis al Jonas, ke li veturu al Ninivo por tie prediki pentofaradon. Sed malobee Jonas enŝipiĝis por alia urbo. Kaj okazis, ke malica ondo ĵetis lin enmaren, kie ne malpli malica baleno englutis lin. Tri tagojn vivis Jonas en la ventro de tiu bestego, kaj poste estis li mirakle resendata sur la marbordon. Tiam pentante la savito konsentis fine plenumi la ordonon de dio.

— Kian rilaton havas tiu biblia sensencaĵo kun la eldono de aŭstria gazeteto?

— Pacience! ... Aŭskultu: Jonas malobeis la dian ordonon kaj pro tio trafis en ventron de baleno. Tio instruas, laŭ mia ekzegeza kompreno je la biblio, ke ĉiam la partikularismo fiaskas ...

Ankaŭ certe fiaskos la entrepreno de k-do Jonas (unu el la plej lertaj aranĝintoj de la V. SAT-kongreso), tial, ke li malobeis la rezolucion voĉdonitan ĉe tiu kongreso, konsentante prizorgi la riproĉitan gazeteton. Li havos similan sorton kiel tiun de sia biblia samnomulo. Se li ne trafos en ventron de baleno, li almenaŭ verŝajne trafos en deficiton kaj finfine devos ĉesi sian mallaŭdindan agadon.

Tiam, imite al sia praulo, li pentos kaj fariĝos la plej fervora predikanto de kontraŭpartikularismo kaj sennaciismo en Aŭstrio.

Tiel estu! ... *Eŭtrapel.*

Juda laborista kongreso en Varsovio

La 1. Aprilo k. j. en Varsovio okazis unu el la plej tragediaj kongresoj, kiu iam ajn okazis en pola respubliko. Alveturis el ĉiuj anguloj de Polio 584 delegitoj de judaj laboristoj por demonstri *rajtojn* de judaj laboristoj al laboro kaj komenci larĝskale batalon por ĉi tragedia rajto.

Rajton al laboro! Rajton lasi sin ekspluati, rajton krei grandajn riĉaĵojn por entreprenistoj — kaj *duon-malsatan* mizeron por si mem! El alparoloj de delegitoj de diversaj politikaj partioj evidentiĝis, ke ili klare konscias gehenon de nuntempa kapitalista vivo kun ĝiaj malaltaj perlaboroj, — sed judaj laboristoj volas, ke ilin oni ne bojkotu kaj speciale ne limigu, ne forigadu el entreprenoj sociaj, komunumaj kaj ŝtataj.

Al ĉiuj estas konataj la faktoj, ke ne nur oni ne allasas judajn laboristojn al entreprenoj ŝtataj kaj komunumaj, sed, precipe lastatempe, aperis tendencoj forigadi jud. lab. sub diversaj pretekstoj eĉ el tiuj entreprenoj, en kiuj ili laboris dekojn da jaroj.

Raportantoj, konsilantoj Erlich Alter, Bukstajn kaj Szafran ilustris siajn konkludojn per kriantaj ciferoj. Montriĝis ekz., ke en Varsovio inter 12000 oficistoj kaj laboristoj, laborantaj en komunumaj institucioj preskaŭ forestas judoj, krom tiuj okupitoj en urba juda hospitalo, cetere magistrato eĉ tie forigas judajn laborantojn. Lastatempe kiam Konsilantaro de Profunuiĝoj penadis allasi jud. lab. al servado en tramveturiloj, dekstrula profunuiĝo kontraŭstaris, deklarante, ke ili ne permesos al jud. lab. kunlabori kun ili. Aliflanke judaj burĝoj neniel helpas al jud. lab., ĉar ĉi bojkoton pleje sentas juda proletaro.

Estis akceptita kelkaj rezolucioj, kiuj faciligos doman vivon al jud. laboristoj.

Judaj laboristoj atendas aktivan helpon flanke de ĉiuj laboristoj de tuta Respubliko, pri kio certigis ilin reprezentantoj de Pola Socialista Partio deputatoj Ŝĉerkovski kaj Gonerko, de Sendep. Soc. Part. dep. Zerbe, de komunistoj dep. Soĥacki, de Sendep. Socistoj T. Kapiltulka kaj d-ro Kruk.

Kongreso unuvoĉe akceptis akran rezolucion protestan kontraŭ sangaj akcidentoj en Stryj, en kiuj respondeca estas registaro, — kontraŭ senĉesa persekutado de lernejaro kaj lingvoj de pola malplimulto. Unuvoĉe oni ekpostulis amnestion por politikaj malliberuloj.

Spr. (Przedjutrze) trad. *H. H-rn, L.*

8½ milionoj da organizitaj laboristoj

La statistikejo de l' Tutsovetia Konsiliĝo Profesi-sindikata komunikas pri plua kresko de l' organizita proletaro en Sovet-Unio. La 1. Okt. 1925 la sovetiaj sindikatoj nombris 7846800 anojn. La 1. Jan. 1926 la sindikatoj enhavis 8303000 anojn. La proksimuma cifero por Majo 1926 estas la kolosa nombro de 8½ milionoj da sindikatanoj.

Tiuj "rekordaj" ciferoj elokvente parolas pri tio, ke la industrio pliordiĝas kaj, kiel rezulto, kreskas la nombro de l' laboristoj en ĉiuj fakoj.

Dneprano.

La I. Granda Ekspozicio esperanta en Lublin

Antaŭ naŭ monatoj lublinaj esperantistoj decidis, por plivigligi la esperantan movadon, organizi ion, ĝis nun tiaamplekse ne estintan en Polio, patrolando de d-ro Zamenhof, nome la I. Granda Ekspozicion esp-an en Lublin, enhavantan kiel eble ĉion, kio en la hodiaŭa stato de tutmonda esp-ista movado kaj ĝia praktika aplikado estis havebla. Dum tiu ĉi tempo estis kolektitaj pere de diversaj organizaĵoj kaj privataj personoj pli ol 1000 ekspozaĵoj.

Fine, la 3. Aprilo k. j. estis aranĝita la Ekspozicio, daŭrinta ses tagojn, kiu okupis tri grandajn salonojn. La tuta materialo estis dividita je multaj fakoj. Estis do tie fakoj de: bela literaturo, historio, muzikaĵoj, medicino, tekniko, pedagogio, stenografio, infanorganizaĵoj, socialistoj, sindikalistoj, katolikismo, protestantismo, bahaismo, oomotismo, kvakroj, liberpensuloj, tolstojanoj, blinduloj, radio-telefonistoj, poste grandega fako de komerco kaj industrio, de komercĉambroj kaj internaciaj foiroj. Unu muro estis senfende okupita per diversnaciaj kaj internaciaj gazetoj esp. kaj miksitaj (naci-esp.).

La frekventado estis sufiĉe granda. Tuj post la Ekspozicio komenciĝis du kursoj en pola kaj juda lingvoj.

Post kelkaj monatoj, aŭtune, ni intencas aranĝi decan pli ampleksan ekspozicion kaj uzi ĝin kiel la rondirantan en ĉiuj pli grandaj urboj de Polio. Ni do insiste petas ĉiujn organizaĵojn, redakciojn, komercajn entreprenojn (uzantaj Esp-on) kaj amikojn de Esp-o sendadi al ni diversspecajn esp-aĵojn. Adreso por alsendo de ekspozaĵoj: *H. Halpern*, Lublin (Polio), Rynek 7.

KRONIKO

Ĉekoslovakio

Gablonz a. N. La ĉi tiea lab. esp. grupo partoprenis kun la kammnitztala grupo la grandan lab. tagon, kiu okazis pentekoste (la 23. Majo) en Reichenberg. Ni formis kun kelkaj alilokaj izoluloj propran grupon dum la demonstracio de ĉ. 70 gek-doj. Ni portis nian grandan esp. flagon kaj du grandajn afiŝojn. La unu kun la surskribo "Esperanto la unueclingvo de la mondproletaro" (germane), la alia "Esperanto je la servo de l' tutmonda proletaro", tri lingve (esper., germ., ĉeke.) La tuta grupo efikis tre multe, vekis la simpatiojn kaj interesigis multajn homojn por Esperanto. Ofte oni aŭdis entuziasmigita "vivu Esperanto". Dum la festeno ni ankaŭ havis ekspozicion, kiu estis multe vizitata. Anoncis sin multaj interesuloj por nova kurso.

La tutan festenon partoprenis ĉirkaŭ 20000 gelaboristoj. *(2067).*

Francio

Paris. Dum la pentekostaj festotagoj okazis ĉi-tie la VI. Kongreso de *Esp. Federacio Lab*, por la franclingvaj teritorioj (Belgio, Francio, Svisio). Ĉeestis delegitoj el Bruselo, Ljono Marsejo kaj el diversaj aliaj urboj, entute 74 kongresanoj. Kiel gastoj ĉeestis ankaŭ k-doj el Britio, Germanio, Hungario kaj Polio.

La raporto de la federacia estraro montris, ke la movado, kvankam malrapide kaj iom kaose, tamen kreskas kaj plifirmiĝas. Se la nombro de membroj ne estas kontentiga, pro la konata neaniĝemo de la francoj, la forto de l' Federacio tamen montriĝas per sia eldonpovo kaj per la larĝa disvendado de lernolibroj kaj disdonado de propagandiloj. La Federacio jam eldonis: 208 paĝan lernolibron (16000 ekz.), 36 paĝan lernolibreton (30000 ekz.), propagandbroŝuron 72 paĝan (3000 ekz.) kaj 60000 flugfoliojn.

Nur la "koresponda kurso" donas en Francio kontentigan rezulton. Dank' al la metoda kaj senlaca laboro de la gvidanto, k-do Robert kaj liaj gehelpantoj, estis eble starigi grupojn en diversaj urboj, kie ĝis nun malestis esp. vivo.

La sidejo de la Federacio restas en Parizo, kaj la kongreso unuanime manifestis sian konfidon al la estraro.

Estis diskutata la temo pri rilatoj inter SAT kaj la nacilingvaj organizoj. En plena unuanimeco estis akceptata rezolucio konforma al tiu voĉdonita ĉe la V. SAT-Kongreso. (Ĉar tiu rezolucio havas tutmondan signifon ni publikigas ĝin sube. — Red.)

Tre bonan efikon sur la kongreson havis la ĉeesto de fremdaj gastoj: ĝi faris, ke la debatoj okazis esperantlingve.

La tagon antaŭ la malfermo de l' kongreso, la pariza grupo organizis propagandkunvenon, kiun ĉeestis proksimume 300 personoj. La programo de tiu kunveno enhavis teatraĵetojn, ŝercaĵojn, kantojn ktp., sed malmulton rilate veran propagandon por Esp-o. Ĝi estis tiom enhavoriĉa, ke ne estis eble profiti la ĉeeston de nefranclingvanoj por fari vere trafan propagandon. Nur kelkajn vortojn povis diri niaj gastoj. Estas vere, ke aŭdiĝis bela voĉo UEA-ana, kantanta esperante. Sed kiajn kantojn? Ho, nur pacemajn, liberpensajn! . . . Ne aŭdiĝis unu vere proleta kanto; ne aŭdiĝis "La Internacio"! . . . La organizantoj de la festo akceptu tiujn rimarkojn ne kiel riproĉojn, sed kiel amikan — ĉar utilan — kritikon.

Ne decus forgesi, ke Esp-o estis tamen trafe propagandata per la legado de letero sendita de Henri Barbusse al la kongreso.

SAT-ano 1

REZOLUCIO PRI RILATOJ INTER SAT KAJ LA NACILINGVAJ ORGANIZOJ

La VI. Kongreso de "Fédération Esperantiste Ouvrière", diskutinte la temon pri rilatoj inter la nacilingvaj organizoj kaj SAT, deklaras, ke estas tute nenecesa kaj sekve maldezirinda la ekzisto de ia ajn statuta ligilo inter por-esperantaj organizoj kaj asocio kies celo estas nur per-esperanta.

La kongresantoj bazas sian opinion sur jenajn konsiderojn:

a) La nacilingvaj organizoj ne povas, kaj sekve ne devas havi la samajn taskojn kiel tiujn de SAT. Ili nepre devas limigi sian agadon en la nura nacilingva propagando de Esp-o kaj en nacilingva publikigado de informoj ricevitaj per Esp-o.

b) Tial, ke SAT havas la tutmondon kiel agadkampon, ĝia tasko devas esti la ebligado de praktika uzado de la lingvo kaj liverado de esperantlingva literaturo.

c) La por-esperantaj, nacilingvaj kaj per-esperanta aparatoj estas same necesaj; ili devas funkcii paralele, ĉiam evitante ian ajn uzurpon.

d) La VI. Kongreso de F. E. O. notas kontente, ke la organoj de SAT ĉiam bonakceptis la komunikojn de F. E. O., kiam ili havis intereson por la tutmonda lab. esperantistaro.

Sovet-Unio

Ĉita (Sibirio). La 7. Marto nunjare ĉita'a SAT-grupo festis, tre modeste, sian 1 jaran datrevenon. Laŭ raporto estis konstatita, ke dum 50 kunsidoj ni akiris sufiĉe grandajn spertojn kaj mondkomprenon, kaj bonan lingvoscion. Ni elkreskis de 8—18 oficialaj SAT-anoj.

De 21. Marto ni kunsidas en la "klubo instruista", laŭkutime ĉiudimanĉe. Kunsidojn ordinare vizitas 15—25 gek-doj. La ĉefa

temo de nia studado nun estas libro: "*ABC de Sennaciismo*", kiun ni jam studas de post Februaro pere de laŭĉapitraj referatoj.

11. Aprilo ni modeste distingis la memoron de D-ro Zamenhof per kunsido dediĉita al li. Estis 4 raportoj, deklamadoj, kantado.

Dimanĉon la 2. Majo ni dediĉas al tago de l' 1. Majo. Okazos studaj raportoj, "vespero de demandoj kaj respondoj". Okaze de l' 1. Majo estis senditaj de ni 16 salutleteroj diverslanden.

Servoj de niaj SAT-anoj estas multfoje uzataj de div. organizaĵoj: "Junpionirtrupoj", "IRH"- kaj "Komjunular"- ĉeloj, Sindikatoj ktp. por kunligiĝo kun eksterlandaj samfakaj org-ĵoj. De niaj org-ĵoj estis senditaj dum la jaroj 1925—1926 pli ol 20 leteroj. Bedaŭrinde venas ne tre multaj respondoj. 2 leteroj ricevitaj, de svedaj metalistoj kaj de ĉekoslovakaj lab. kor-oj, estis enpresitaj en la loka gazeto.

Krom tio nia SAT-grupo mem kaj ankaŭ instruista esp.-rondeto sufiĉe vigle korespondas kun eksterlando. Precipe ni penas organizi konstantan korespondadon kaj interŝanĝadon de artikoloj (esp.-servon) kun Japanio, Ĉinio kaj al. ekstrem-orientaj landoj.

Nun en la urbo Ĉita la esp.-kursoj ekzistas en 10 diversaj lernejoj de unua kaj dua gradoj kaj de specialaj, kun ĉirkaŭ 200 gelernantoj.

La esp.-laboro en la lernejoj estas gvidata per speciala "urb-komitato de gelernantoj-esp-istoj", antaŭnelonge reelektita kaj kaj ekzistanta jam pli ol du jarojn.

Krom tio funkcias esp-kursoj ĉe: klubo instruista, ĉeffervojadministrejo, elektrostacio kaj poŝtoficejo. Ĝenerale ni kalkulas plimalpli bone esp-lingve parolantajn gek-dojn ĉirkaŭ 80—100 personoj. SEU-anoj estas en Ĉita 150 gek-doj (plena normo destinita al ni de CK de SEU), kaj en limoj de transbajkala gub. krom Ĉita 35 gek-doj. Sed ankoraŭ nenia oficiala SEU-komitato ekzistas. Tio grave malfaciligas nian laboron.

Tamen ĝenerale niaj atingoj estas ne malsignifaj! *K. Fade.*

Ĥabarovsk. Ĉe Komsomola klubo (Komjunula klubo) je nomo de Kubjak, estas organizita esperanta rondeto. Gvidas k-do Verŝinin. Aniĝis dume nur 12 gekomjunuloj. Adreso: Sovetio. Ĥabarovsk. Poŝt-restante al k-do Verŝinin A. I. (por kluba rondeto) *A. V. (4638)*

Moskvo. Komence de Aprilo 1926 en la I. Zabora Eksperimenta Lernejo ekorganiziĝis esp. rondeto kun 15 membroj. Gvidanto estas k-do Svistunov. Esp. studado okazas dufoje dum semajno. Dum festo laborista Unua de Majo parto da rondeto partoprenis kaj multe propagandis. Sur la plej videbla loko estis devizo, skribita esperante "Proletoj de tutmondo unuiĝu!" Tio estis efektive internacia festo. Ni membroj de esp. rondeto esperas, estonte pli bone ellerni esp. lingvon. Tre grandegan dankon al k-do Svistunov, kiu ne kompatas sian altvaloran tempon pro internacia afero!

Samara. Nia Gubernia Fako de SEU estas nun oficialigita, statuto de ĝi ankaŭ estas konfirmita.

La 19. Aprilo ĉe ni estis memorvespero de Zamenhof. K-do Astafjev raportis pri vivo de Zamenhof kaj pri Esp-o. Dum parolado ĉeestis kelkaj idistoj kun konata ilia ĉefo Ĥovanskij. Poste unu k-do demandis, kiu diferenco estas inter Esp-o kaj Ido. K-do Astafjev klarigis. Tiam idistoj eksaltis de siaj lokoj kaj foriris parolante: "Ni alvenis por honori memoron de Zamenhof, sed ne por diskuto", kvankam k-do Astafjev nenion malafablan diris pri Ido.

Post la parolado estis prezentaĵo de teatraĵo "Teha" pri Esp-o.

Por ĉi tago de ni estos eldonita murgazeto "Samara Esperantisto", kun raporto pri Zamenhof, artikoloj pri nia movado en Samara kaj versaĵo de unu labkor. en rusa lingvo pri Esp-o.

Vitebsk. La 18. Aprilo ekfunkciis nova grupo de Esperantistoj. Ĝi organizis distriktkomitaton kaj decidis revigligi kaj restarigi la movadon. K-do Lapenko informis la kunsidon pri la decido de la 1. Tutblankrusa Konferenco kaj 2. Kongres-Moskva. En komitato estis elektitaj: k-doj Lapenko, Kovalskij, Golikov, Dvorkin. La distriktkomitato dume lokiĝas en loĝejo de k-do Lapenko st. Bebel 65, 2.

Nun Gubernia Komitato decidis pretigi sin por estonta vintra laboro. Nia plej grava manko estas nehavo de spertaj instruistoj. Dum somero ni pensas pretigi en la kursoj gvidantoj por elementaraj rondetoj en kluboj.

Ĉi-laboro estos por tuta somero.

Nun ni havas kvin rondetojn, el kiuj kvar estas finantaj siajn programojn kaj la kvina estas nove organizita el komsomolanoj.

Gub. Komitato de VLKSM (de komsomol) nun helpas al ni en nia laboro.

Membroj de SEU ĉe ni estas 127, SAT 16.

P. Kuharskij, SAT-ano 5913

Alvoko!

Ni alvokas ĉiujn esp-istojn, renkontantajn hungaron Luczák Géza, kiu estas 26 jara, seruristo kaj kutime kunveturas kun edzino de Berta György, ke ili sciigu lian restadejon kaj loĝejon al "Hungaria Esperantista Societo Laborista, Budapest, IX. Márton-u. 28". Li malaperis el sia urbo Pesterzsébet kun 880 000 hungaraj kronoj de sia grupo kaj laŭ onidiro migris Belgion. Kompreneble li pro tiu ago sia ne meritas la helpon de la esp-istoj kaj samtempe ni sciigas al ĉiuj, al kiuj li montras legitimilon de lab. esp. grubo en Pesterzsébet, ke tia legitimilo estas falsa.

Alvoko!

Por dokumente montri la uzeblecon kaj servemon de Esp-o, kiel la sola tutmonda interligilo de lab-istaro, kaj tiamaniere plivastigi la intern. lingvon en nia distrikto, ni varmege petas ĉiulandajn gek-dojn (precipe agrikulturistojn aŭ kompetentajn k-dojn), sendi artikolojn, inform-materialon pri agrikulturo, formoj de vilaĝan-mastrumaĵoj, vilaĝana vivo ktp. Ekzemple:

1. Por kia speco de gramenoj kaj kiamaniere oni kulturigas kampojn en via lando?
2. En kia kvanto kaj laŭ kiaj kondiĉoj vialandaj terkulturistoj posedas teron?
3. Formoj de vilaĝ-administr-regado?
4. Per kiaj metodoj terkulturistoj en via lando bataladas kontraŭ sekvetero?
5. Kiaj laborkondiĉoj estas por la dungataj terkultur-laboristoj?
6. Pri brut- kaj birdedukado, kaj ankaŭ pri laktindustrio en via lando?
7. Ĉu estas kolektivaj kamparan-mastrumaĵoj kaj per kiaj rimedoj akcelas tion via landaregistaro?, ktp. pri aliaj konformaj temoj.

La inform-materialo estas necesa por publikigado en la loka vilaĝana jurnalo "Krasnij kurgan" (Ruĝa kurgan'o) kaj en murgazeto de vilaĝandomo. Tre dezirataj estas fotografaĵoj, naciaj ilustr. gazetoj pri agrikulturo, arbarkulturo, brut-bird-edukado ktp. Rekompense ni povas sendi la konfirman materialon nian.

Ni kredas, ke la tutmondaj gekamaradoj helpos por nia afero! Sendu ĉion laŭ adreso: *Sovet-Unio, Kurgan, Uralsk. oblast.* (Sibirio), poŝtkesto (poŝtovijasŝik) n-o 41, al *Kurgan'a ĉelo de Sovetlanda Esperant. Unuiĝo,* ĉe Laborista klubo de "Oktobra Revolucio". *(3930)*

KARAVANO DE LONDONO AL LENINGRADO

SAT-ano J. W. Sons, delegito de la Lab. Esperanto-Klubo Londono, kun la aprobo de la komitato de BLES (Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj) aranĝas karavanon al la VI. Kongreso de SAT Londono—Leningrado. Ĉiuj, kiuj deziras partopreni, skribu senprokraste al: **2. MACCLESFIELD ST., LONDON W. 1 (Angl.)**

LIBREJA FAKO DE SAT

MALKARAJ LIBROJ

Fundamenta Krestomatio de D-ro Zamenhof (460 paĝoj) 2.75 mk. g.
Fundamento de Esperanto (france, angle, germ., ruse, pole) 1.25 „ „
Lingvaj Respondoj (92 paĝoj), sur simpla papero . . . . 1.50 „ „
Lingvaj Respondoj „ „ sur luksa papero . . . . 2.25 „ „
Marta (237 paĝoj) Romano . . . . 2.— „ „
La Rabistoj (144 paĝoj) . . . . 1.20 „ „
Vortaro de Esperanto (esperanto-esperanta), de Kabe . . 2.50 „ „

La prezoj kompreniĝas inkluzive afranko. La livero okazas nur kontraŭ antaŭa pago. Rekomendite ni sendas, se oni aldonas 15 % pli al la pago.

Administracio de SAT, Leipzig O 27, Colmstr. 1 (Germ.)

SENNACIECA REVUO

Monata Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

LITERATURO SCIENCO PEDAGOGIO

Prospekton kaj provnumeron sendas senpage:

Administracio de SAT
Rich. Lerchner, Leipzig O 27

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG